


Metodo 11

Nouvelle édition

Corrigé - type

Ce fascicule a été conçu pour aider ceux qui étudient l'espéranto à l'aide du manuel **Metodo 11**, en particulier ceux qui étudient de façon autonome.

Les propositions de réponses aux questions ouvertes devraient aider les débutants, mais des variations sont possibles. Ces exercices sont identifiables par le picto .

Prenez l'habitude de répondre par une phrase complète.

Exercez-vous à répondre aussi à haute voix.

Quant aux exercices structuraux, ils visent à ancrer des automatismes. Apprenez-en un exemple par cœur, comme une formule mathématique

Unua leciono – La familio de Marko

Exercice A, page 4

1. *Kio ...?* Marko estas lernanto kaj sportisto.
2. *Ĉu ...?* Jes, li sidas sur seĝo.
3. *Kio ...?* Sur la skribotablo estas / kuŝas komputilo.
4. *Kiu ...?* Marko sidas sur seĝo.
5. *Ĉu ...?* Ne, Marko ne laboras en fabriko.
6. *Kiu ...?* La patro de Marko laboras en fabriko.
7. *Kio ...?* La patro estas laboristo.
8. *Kiu ...?* La patrino de Marko instruas.
9. *Kio ...?* La patrino estas instruistino.
10. *Kiuj ...?* La patro kaj la patrino de Marko laboras.
11. *Ĉu ...?* Ne, ili ne estas en la domo, ili laboras.
12. *Kiu ...?* La patrino laboras multe: ŝi estas instruistino kaj ŝi laboras ankaŭ en la domo
13. *Ĉu ...?* Jes mi laboras / ne, mi ne laboras: mi estas studento / mi estas emerito (retraité).
14. *Ĉu ...?* Ne, mi ne laboras en fabriko / mi laboras en la domo.

Exercice B, page 4

1. Marko / Li
2. instruas / laboras / lernas
3. sur
4. oj / oj
5. en

Exercice A, page 6

1. La instruisto demandas, ĉu Marko estas sportisto.
2. La instruisto demandas, ĉu li sidas sur seĝo.
3. La instruisto demandas, ĉu la skribotablo estas en la ĉambro.
4. La instruisto demandas, ĉu li estas lernanto.
5. La instruisto demandas, ĉu estas komputilo sur la tablo.
6. La instruisto demandas, kio estas Marko.
7. La instruisto demandas, kiuj ne estas en la domo.

CONSEIL

À l'écrit, n'oubliez pas la virgule quand vous changez de proposition!

Exercice B, page 6

1. Li diras, ke Marko estas sportisto.
2. Li diras, ke li sidas sur seĝo.
3. Li diras, ke la fotoj estas en la komputilo.
4. Li diras, ke estas komputilo en la ĉambro.
5. Li diras, ke estas elektronikaj libroj en la komputilo.

SOUVENEZ-VOUS que **ke** est une conjonction, pas le pronom relatif.

Dua leciono – La nova ĉemizo

Exercice A, page 9

1. *Kiu ...? Ĉu ...?* Marko havas amikino. Lia amikino estas bela.
2. *Kio ...?* Ana estas lernantino, ŝi estas la amikino de Marko.
Mi ne scias, ĉu ŝi estas sportistino.
3. *Kion ...?* Post la kursoj, ŝi iros al la urbo.
4. *Kion ...?* Ŝi aĉetos ĉemizon.
5. *Kian ...?* Ŝi aĉetos novan ĉemizon.
6. *Ĉu ...? Ĉu ...?* Jes, ŝi jam havas ĉemizojn, sed Ana opinias / diras, ke ili ne estas belaj. Ili ne estas novaj kaj ne modaj!
7. *Ĉu ...?* Ne, ŝi ne havas multe da mono, ŝi estas lernantino. La monon donas al ŝi ŝiaj gepatroj.
8. *Ĉu ...?* Ne, ŝi ne iros al la urbo kun Marko. Marko estas knabo, al li ne plaĉas iri kaj aĉeti!

N'OUBLIEZ PAS que la moitié de la réponse est déjà dans la question.

Kia...? → réponse -a (bela, nova, malmoda)

Kiaj...? → réponse -aj (belaj, novaj, malmodaj)

Kian...? → réponse -an (belan, novan, malmodan)

Kiajn...? → réponse -ajn (belajn, novajn, malmodajn)

Kio...? → réponse -o (libro, komputilo, tablo)

Kion...? → réponse -on (libron, komputilon, tablon)

9. *Kia ... ?* Ŝia fratino estas juna.
10. *Ĉu ... ?* Jes, mi opinias / supozas, ke Ana plaĉas al Marko.
11. *Ĉu ... ?* Jes, mi havas multe da geamikoj. Ili lernas kun mi / ili laboras en mia fabriko.
12. *Ĉu ... ?* Mi ne scias, ĉu ili lernas Esperanton / mi demandos al ili, ĉu ili lernas Esperanton / Unu el ili lernas Esperanton.
13. *Ĉu ... ?* Jes, mi parolas al ili pri Esperanto. Ili scias, ke Esperanto estas internacia lingvo kaj iuj lernos per komputilo.

Exercice B, page 10

1. inon / ŝi / os / ŝia / al / an / on
2. ge / on

Exercice A, page 12

1. Jes, sur la tablo ni vidas lingvolibron.
2. Jes, En la domo ni vidas grandan knabon.
3. Jes, en la klaso ni vidas lernantojn.
4. Jes, sur la seĝo ni vidas knabon.
5. Jes, en la ĉambro ni vidas belajn fotojn.
6. Jes, en la fabriko ni vidas gelaboristojn.
7. Jes, sur la seĝo, ni vidas novan ĉemizon.

*On passe du sujet (estas) au complément ni vidas, donc -n
→ Jes, en la komputilo ni vidas elektronikajn librojn.
Mais on pourrait varier l'ordre des mots, on sait toujours qui est le sujet, qui est le complément:
Elektronikajn librojn vidas ni.
Ni elektronikajn librojn vidas.*

Exercice B, page 12

1. Mi vidas ŝin.
2. Mi vidas ĝin.
3. Mi vidas ilin.
4. Mi ŝatas ilin.
5. Mi ŝatas ilin.
6. Mi komprenas viajn demandojn.
7. Mi ŝatas vian novan ĉemizon.

On remplace le complément par le pronom personnel.

Exercice C, page 12

1. Mi vidas lian amikilon.
2. Mi vidas ŝian ĉemizon.
3. Mi vidas ŝian amikon.
4. Mi vidas iliajn telefonojn.
5. Mi vidas lian skribotablon.
6. Mi vidas miajn bonajn librojn.
7. Mi vidas lian junan amikilon.

*CONSEIL
Décomposez si besoin est:
La lernanto havas libron;
mi vidas la libron de la lernanto;
mi vidas la libron de li;
mi vidas lian libron.*

Tria leciono – Al la lernejo

Exercice A, page 15

1. *Kie ... ?* Ana kaj Marko parolas sur la strato / surstrate.
2. *Ĉu ... ?* Ne, ili ne iras al la domo, ili iras al la lernejo.
3. *Kiam ... ?* Ana aĉetis novan ĉemizon, hieraŭ post la kursoj, kiam ŝi iris al la urbo.
4. *Kie ... ?* Marko kaj Ana trinkis kaj manĝis en trink-ejo / en kaf-ejo; en la urbo / en la urba centro.
5. *Ĉu ... ?* Ne, Ana ne estas riĉulino, ŝi havas malmulte da mono, kiun la gepatroj donas al ŝi / tamen sufiĉas mono al ŝi, ĉar (parce que) ŝi laboras en vendejo.
6. *Kiam ... ?* Ŝi laboras post la kursoj.
7. *Kie ... ?* Ŝi laboras en vendejo / en granda, urba vendejo.
8. *Kiel ... ?* Ili rapide iras al la lernejo, ili eĉ kuras.
9. *Kion ... ?* La instruisto volas scii, ĉu ili tro longe dormis, ĉar ili malfruas. Li ne scias, ke Ana kaj Marko parolis surstrate kaj malrapide iris.
10. *Ĉu ... ?* Ne, la aliaj gelernantoj ne malfruas. La instruistoj ne ŝatas, kiam gelernantoj malfruas.

11. *Ĉu ... ?* Ana kaj Marko estas ne bonaj, nemalbonaj lernantoj. Ili serioze lernas en la kursoj kaj en la domo, sed ili estas junaj.
12. *Ĉu vi ... ?* Jes, mi estis serioza lernanto, mi ŝatis lerni kun instruisto. / Ne, mi ne estis serioza lernanto, al mi ne plaĉis la kursoj / mi ŝatis lerni per komputilo aŭ kun amikoj.
13. *Kio ... ?* Lernejo estas ejo, kie junuloj lernas.

Exercice B, page 16

1. e / ulin / ul / ej
2. ge / on / ej

Exercice C, page 16

tri mil kvar cent dudek kvin / cent dudek kvin / du mil cent tridek / dek unu mil cent dudek naŭ / ok cent dek tri

Exercice A, page 18

1. Malfeliĉulo estas homo, kiu estas malfeliĉa.
2. Riĉulo estas homo, kiu estas riĉa.
3. Belulo estas homo, kiu estas bela.
4. Maljunulo estas homo, kiu estas maljuna.
5. Nigrulo estas homo, kiu estas nigra.
6. Junulo estas homo, kiu estas juna.
7. Malriĉulo estas homo, kiu estas malriĉa.

*CONSEIL: Repérez la racine avec le suffixe -ul- et utilisez la structure **homo, kiu***

Exercice B, page 18

1. La lernanto, kiun mi vidas bone lernas.
2. La knabino, kiun mi vidas estas bela.
3. La sportisto, kiun mi vidas kuras rapide.
4. La teo, kiun ili trinkas estas verda.
5. La kuko, kiun ili manĝas estas bongusta.
6. La lingvo, kiun ili lernas estas bela.
7. La libro, kiun ili legas estas interesa.

Utiliser le pronom relatif complément:

*l'homme qui fait **la homo, kiu faras** (sujet)*

*l'homme que je vois **la homo, kiun mi vidas** (complément)*

la knabo (lin mi vidas) estas granda

la knabo, kiun mi vidas estas granda

ATTENTION

*Le relatif est toujours **kiu / kiun** même lorsqu'il se rapporte à un objet:*

la libro, kiun mi legas

Exercice C, page 18

1. La lingvoj, kiujn ŝi lernas estas belaj.
2. La kukoj, kiujn ŝi manĝas estas bongustaj.
3. La knaboj, kiujn ŝi vidas estas belaj.
4. La laboristoj, kiujn ŝi vidas estas junaj.
5. La ĉemizoj, kiujn ŝi montras estas belaj.
6. La domoj, kiujn ŝi vidas estas altaj.
7. La amikoj, kiujn ŝi havas estas simpatiaj.

*Même exercice au pluriel, donc **kiujn***

la libroj (ilin ŝi legas) estas interesaj

la libroj, kiujn ŝi legas estas interesaj

Kvara leciono – Scivolema fratino

Exercice A, page 21

1. *Kian ... ?* Ana havas junan, scivoleman fratinon.
2. *Ĉu tian ... ?* Jes, mi havas tian fratinon, ŝi eniras mian ĉambron / ŝi legas miajn mesaĝojn en mia komputilo / ŝi kuras al la telefono kaj respondas eĉ, kiam la homoj deziras paroli al mi.
Ne, mia fratino estas bone edukita, ŝi ne legas privatajn mesaĝojn aŭ ne aŭskultas privatajn telefonalkvokojn.
3. *Kion ... ?* En la telefono, ŝi vidis retmesaĝojn, kiuj ne estis ŝiaj, sed tiuj de Ana kun fotoj!
4. *Kion ... ?* Mi ne scias, kion oni vidis sur la fotoj sed certe oni vidis ion, kio ne koncernas ŝin, ĉar ili estas en la komputilo de Ana. Povas esti fotoj de Ana en kafejo kun Marko, aŭ kun geamikoj.

5. *Kien...?* Mi metas mian telefonon en mian poŝon aŭ en mian sakon. Kiam mi laboras, mi metas ĝin sur la tablon; ankaŭ en la laborejo, mi ĉiam metas la telefonon en proksiman lokon. Dum la lecionoj, ni ne povas havi telefonon, ĝi restas en mia sako.
6. *Ĉu...?* Jes, mi tre regule eĉ konstante sendas retmesaĝojn, personajn al miaj geamikoj. En la laborejo, mi sendas profesiajn mesaĝojn ne al geamikoj, sed al laboristoj aŭ gekolegoj. Estas rapide sendi retmesaĝojn al multaj homoj, do mi regule sendas retmesaĝojn por diri, kie mi estas, kien mi veturas, kiel mi veturas, ĉu mi baldaŭ alvenos, kion mi manĝis, kion mi faras aŭ faris aŭ faros. Mi supozas, ke tiaj informoj interesas miajn geamikojn!
7. *Kien...?* Post la kursoj mi iros hejmen (al mia domo) / al sportejo / al kinejo / al kafejo / ...
8. *Kien...?* Seriozaj gelernantoj iras hejmen aŭ al la biblioteko por boni lerni aŭ fari la hejmajn ekzercojn / ...
9. La instruisto diras: Silentu, prenu vian libron, malfermu vian libron ĉe paĝo 21 / parolu laŭte / malfermu la fenestron / ...

Exercice B, page 22

1. sur
2. en / al / on
3. on / on / al / n / al / on (*il était ailleurs, il change de lieu*)

Exercice C, page 22

Quelques exemples de réponses possibles:

1. Aŭdu muzikon.
2. Li skribu retmesaĝon.
3. Iru al la lernejo / iru lernejon / iru lernejen.
4. Ni kisu amikinin.
5. Fermu la fenestron.
6. Ne mi kuru hejmen (*changement de lieu*).
7. La infanoj dormu bone
8. Ili montru la fotojn.
9. La homoj estu feliĉaj.
10. Ĉiuj trinku akvon.

Vous pouvez utiliser tous les pronoms personnels, pas seulement vi!
Nous avons séparé les phrases verbe + COD

Exercice A, page 24

1. Kiu metis la seĝon antaŭ la tablon...?
2. Kiu metis la libron sur la seĝon...?
3. Kiu metis la retmesaĝojn en la komputilon...?
4. Kiu metis foton sur la ekranon...?
5. Kiu metis ŝuojn sub la seĝojn...?
6. Kiu metis vestojn sur la tablon...?
7. Kiu metis vestojn inter la sakojn...?

Lieu où l'on est: -o
En la sako estas telefono.
Lieu où l'on va ou vers lequel on déplace quelque chose: -on
Kiu metis la telefonon en la sakon...?

Exercice B, page 24

1. Jes, fermu ĝin!
2. Jes, legu ĝin!
3. Jes, rigardu ĝin!
4. Jes, trinku ĝin!
5. Jes, malfermu ĝin!
6. Jes, manĝu ĝin!
7. Jes, kunportu ĝin!

Kvina leciono – Nova aŭto



Exercice A, page 27

1. *Kien...?* Sinjoro Rapid iras al aŭtovendejo.
2. *Kion...?* Li deziras aĉeti novan aŭton / modernan veturilon.
3. *Kion...?* La vendisto nepre volas vendi novan veturilon al la kliento.
4. *Kiaj...?* La aŭtoj estas belaj, modernaj, modaj, senbruaĵ, sobraj, rapidaj... sed multekostaĵ!
5. *Kial...?* Sinjoro Rapid ne aĉetis la plej multekostan aŭton, ĉar ĝi estas tro multekosta / ĉar Sinjoro Rapide ne havas sufiĉe da mono eĉ se li aĉetas kredite (sed krediton li devos poste pagi!) / ĉar li opinias, ke aŭto estas nur veturilo kaj li ne pretas pagi tro por bela aŭto.
6. *Kia...?* La aŭto devas esti sobra (ĉar benzino tre kostas), senbrua (por ne ĝeni la homojn), sufiĉe granda por la tuta familio sed ne tro, por facile trovi park-lokon en la urbo, franca por helpi (*aider*) francan industrion kaj evidente malmultekosta!

7. *Kia ... ?* Mia aŭto estas franca / japana / germana / ...; nova / malnova / sufiĉe moderna; ruĝa / blanka / verda / nigra ...; granda / malgranda / mezgranda / ...
8. *Ĉu ... ?* Eĉ se mi neniam vidis la aŭton de Sinjoro Rapid, mi opinias, ke mia aŭto estas pli / malpli bela ol lia aŭto / mia estas tiel bela / malbela kiel la aŭto de sinjoro Rapid.
9. *Kiam ... ?* Mi aĉetis mian aŭton antaŭ du jaroj / pasintan jaron / en 2015 / ...
10. *Ĉu ... ?* Jes mi aĉetos novan aŭton venontan jaron / post tri jaroj / kiam mi havos monon / kiam mi trovos aŭton, kiu plaĉas al mi / kiam mia ne plu funkcios / ...
Ne, mi ne aĉetos novan aŭton ĉar mia estas tute nova / ĉar mi ne bezonas aŭton / ĉar nun vojaĝas nur per urbaj trafikiloj (aŭtobuso, tramo, metroo) / ...
11. *Ĉu ... ?* Laŭ mi / mia opinie, la vendisto estas malbona vendisto ĉar li ne sukcesis vendi aŭton al la kliento, li ne kapablas kompreni kian aŭton sinjoro Rapid deziras aĉeti.
12. *Kiom ... ?* Mi parolas du / tri / kvar lingvojn. / Mi parolas nur mian gepatran lingvon.
13. *Ĉu ... ?* Jes, Esperanto estas facila lingvo, ĝi estas malpli malfacila ol lingvoj kun esceptoj, komplika gramatiko Esperanto estas regula (eĉ la verboj estas simplaj!)
14. *Ĉu ... ?* Jes, mi estas tiel aĝa, kiel mia amiko. / Ne, mi estas pli / malpli aĝa ol mia amiko. Mi estas 17jara / 70jara kaj li estas 18jara / 65jara.
15. *Ĉu ... ?* Jes, li estas tiel granda kiel mi / li estas pli / malpli granda ol mi .

Exercice B, page 28

1. ilo / ilo / iloj 2. pli / ol / malpli / ol 3. ol / el 4. ĉar

Exercice C, page 28

- vend-isto*: vendeur *kun-preni* : prendre avec soi
jar-cento: siècle *al-veni*: arriver
semajn-komenco: début de semaine
kelk-monata: âgée de quelques mois *ne-vole*: involontairement
tag-mezo: midi *de-nove*: à nouveau
grand-kap-ulo: une grosse tête *al-veturi*: arriver en voiture
vetur-ilo: véhicule *kontraŭ-agi*: agir contre *mal-helpi*: empêcher *aŭskult-ilo*: écouteur
manĝilo: couvert (couteau, fourchette, cuillère) *mal-laŭta*: bas *mallaŭte*: doucement *vend-ejo*: magasin
jara: annuel *antaŭ unu jaro*: il y a un an *post tri monatoj*: dans trois mois

*Vous allez constater qu'il est plus difficile de traduire de l'espéranto en français que du français en espéranto.
Toujours repérer la racine et décomposer le mot: racine + préfixe(s) ou suffixe(s) et terminaison.*

Exercice A, page 30

1. Ana estas pli juna ol Marko.
2. Domo estas pli multekosta ol aŭto.
3. Kuko estas pli kosta ol pano.
4. Marta estas pli bela ol Ana.
5. La vendisto parolas pli rapide ol la sinjoro.
6. La instruisto venas pli frue ol la lernantoj.
7. Marko kuras pli rapide ol Ana.

Lisez chaque phrase à haute voix pour vous imprégner de la structure tiel ... kiel avant de passer à malpli ol

Exercice B, page 30

1. Ana estas malpli aĝa ol Marko.
2. Aŭto estas malpli kosta ol domo.
3. Pano estas malpli kosta ol kuko.
4. Ana kuras malpli rapide ol Marko.
5. Semajno estas malpli longa ol monato.
6. La sinjoro parolas malpli rapide ol la vendisto.
7. Koko flugas malpli bone ol birdo.

*Lisez le modèle à haute voix. Lisez chaque exemple à haute voix pour vous imprégner de la structure
Superlatif le plus = la plej*

Exercice C, page 30

1. Esperanto-libroj estas la plej interesaj.
2. La domo de marko estas la plej bela.
3. La aŭto de la vendisto estas la plej rapida.
4. La libro de Ana estas la plej nova.
5. La fratino de Ana estas la plej juna .
6. Sinjoro Rapid estas la plej feliĉa.
7. La kato de Ana estas la plej bela .

RAPPEL:

que	<i>pronom relatif:</i>	<i>l'homme que je vois</i> <i>les livres que je lis</i>	<i>la homo, kiun mi vidas</i> <i>la libroj, kiujn mi legas</i>
	<i>comparatif:</i>	<i>il est plus grand que moi</i> <i>il est aussi grand que moi</i>	<i>li estas pli alta ol mi</i> <i>li estas tiel alta kiel me</i>
	<i>conjonction:</i>	<i>il dit que</i>	<i>li diras, ke</i>

Pensez que l'espéranto est toujours plus précis que le français.

Que d'eau, que d'eau! (quantité) **Kiom da akvo!**

Qu'il parte! (souhait) **Li foriru!**

Sesa leciono – Maja



Exercice A, page 33

1. *Kiun ... ?* Maja iĝis malsana supozeble lunde, kiam ventegis kaj malvarmegis.
2. *Ĉu ... ?* La malfeliĉo ne estis tro granda, tamen ŝi malvarmumis kaj bezonis kuracistan helpon.
3. *Kien ... ?* Ŝi devis iri en la liton / liton.
4. *Je kioma horo ... ?* Ŝi devis trinki medikamenton matene kaj vespere; laŭ la bildo, matene je la 9a, do verŝajne vespere ankaŭ je la 9a.
5. *Kiam ... ?* Ŝi fartos pli bone post tri tagoj, do jam vendredon / vendrede
6. *Kio ... ?* Kuracisto estas homo, kiu kuracas ekz. dentkuracisto kuracas dentojn, kiam ili doloras; bestkuracisto kuracas bestojn, ekz. katon aŭ *hundon* (*chien*).
7. *Kial ... ?* Maja bezonis kuraciston ĉar ŝi havis altan temperaturon kaj ŝia patrino *maltrankviliĝis* (*trankvila* = *tranquille*)
8. *Kial ... ?* Maja malsaniĝis, ĉar estis malvarmege; eble ŝi ne surhavis sufiĉe varmajn vestaĵon. Do ŝi *malvarmumis* (*malvarmumi* = *prendre froid*).
9. *Kial ... ?* La doktoro diras, ke vendredon, ŝi jam kantos, ĉar li scias, ke Maja rapide resaniĝos kaj ke ŝi devos kanti dum koncerto.
10. *Kial ... ?* Li revizitos ŝin por kontroli, ĉu ĉio estas en ordo, ĉu la kuraciloj (medikamentoj) efikas, ĉu ŝi fartas bone.
11. *Kion ... ?* Verŝajne, dum ŝi estis malsana, Maja nenion faris, ŝi kuŝis, dormetis, eble rigardis televidon se la kapo kaj la okuloj ne doloris, eble legis.
12. *Ĉu ... ?* Jes mi estis malsana / mi estis operaciita / mi falis kaj la mano / la piedo *rompiĝis* (*casser*).
Ne. Feliĉe mi neniam estas malsana, eĉ dum vojaĝo mi ne suferas pro lakso (turista). Kaj vintre mi ne malvarmumas!
13. *Je kioma horo ... ?* Mi matenmanĝas frue, je la 6a kaj duono; nur dimanĉe, ĉar mi ne laboras / ne vizitas la lernejon , mi havas la plezuron matenmanĝi pli malfrue, je la 8a-oka kaj duono.
Mi tagmanĝas je la 12a (dekdua) kaj kvarono / inter la 12.30 (la dekdua kaj duono) kaj la 13a kaj duono.
Mi vespermanĝas, kiam miaj gepatroj revenis el la laboro, plej ofte je la 19.30 (la deknaŭa tridek).

Exercice B, page 34

1. u / u / i / on / u
2. re / eto / ego

Exercice C, page 34

klasoĉambro: salle de classe *tagmezo*: midi
mezlernejo: collège (*bazlernejo*: école primaire, *supera lernejo*: lycée, *altlernejo*: grande école)
leterkesto: boîte aux lettres *okulharo*: sourcil *ĉefvendisto*: vendeur en chef

Exercice A, page 36

1. Jes, mi deziras, ke vi lernu vian lecionon.
2. Jes, mi deziras, ke vi aŭskultu la instruiston.
3. Jes, mi deziras, ke vi skribu tekston.
4. Jes, mi deziras, ke vi faru ekzercojn.
5. Jes, mi deziras, ke vi kunportu viajn librojn.
6. Jes, mi deziras, ke vi montru ilin al la instruisto.
7. Jes, mi deziras, ke vi hejmenvenu frue.

Exercice B, page 36

1. Ĉu vi estas certa, ke estis marde...?
2. Ĉu vi estas certa, ke estis merkrede...?
3. Ĉu vi estas certa, ke estis ĵaŭde...?
4. Ĉu vi estas certa, ke estis vendrede...?
5. Ĉu vi estas certa, ke estis sabate...?
6. Ĉu vi estas certa, ke estis dimanĉe...?

Exercice C, page 36

1. Parolu al mi pri tiu bela birdo.
2. Mi aŭdis belan kanton.
3. Mi manĝis bongustajn kukojn.
4. Mi legis interesan libron.
5. Mi vidis modernegan aŭton.
6. Mi kisis belan knabinon.
7. Mi rigardis belan bildon.

Mi vidas belan domon.
Parolu pri tiu bela domo.
(-n pour le complément direct, -o après une préposition)

Sepa leciono – Bona novaĵo

Exercice A, page 39

1. *Kiam ... ?* Marko devas ellitiĝi je la sepa, kiam la patrino vekas lin.
2. *Ĉu ... ?* Ne, li ne ŝatas ellitiĝi, ĉefe dimanĉe, kiam li ne vizitas lernejon; supozeble, kiel multaj gejunuloj, sabate vespere li promenis kun geamikoj, iri al dancejo au kafejo, malfrue enlitiĝis do li ne sufiĉe dormis.
3. *Kial ... ?* Li devas ellitiĝi tiel frue por helpi sian patron en la ĝardeno, kaj pli bone estas labori frue, kiam ne estas tro varme.
4. *Kio ... ?* Marko havas bonan apetiton, ĉar matenmanĝe (dum la matenmanĝo), li ne nur trinkos kafon au teon, sed li manĝos porkaĵojn, panon, buteron kaj eĉ dolĉaĵojn. Ĝenerale Francoj matenmanĝas malpli ol germanoj aŭ rusoj. Tio estas malbona *kutimo* (*habitude*).
5. *Kiu ... ? Kiam ? Kie ?* Supozeble la patrino kuiris la manĝaĵon, ĉar jam en la unua leciono, la patrino de Marko *plendas* (*se plaint*), ke estas multe da laboro hejme. Supozeble ŝi dividas la laboron kun *sia edzo* (*son mari*): ŝi laboras en la domo, li laboras en la ĝardeno. Ŝi preparis la matenmanĝon, ĉu frumatene, ĉu sabate vespere en la *kuirejo* (*kuiiri = faire cuire*).
6. *Kiun ... ?* La novaĵon, kiun ŝi diras al Marko rilatas al la hundino de la onklo, kiu naskis hundidojn.
7. *Kiu ... ?* Ĉiuj ĝojas pro la etaj hundoj, sed ĉefe Anna, kiu ŝatus havi hundon.
8. *Kial ... ?* Ana deziras hundon, kiel multaj homoj, ĉar ŝi bezonas amikon, kiu komprenos ŝin sen paroloj. Laŭ la statistikoj post 6 monatoj en urbo, homoj bezonas beston por havi kontakton kun la naturo; ĝenerale ili elektas hundon aŭ katon, eĉ se nun novaj dorlotbestoj aperas.
9. *Ĉu ... ?* Jes, mi ŝatas hundojn, ĉar ili havas bonajn rilatojn kun homoj. Necesas promenigi ilin kaj survoje vi renkontas homojn, kiuj alparolas vin pri la hundo; necesas manĝigi ilin, do zorgi (*s'occuper de*) ne nur pri ŝi, sed pensi pri iu alia. Hundoj estas grandaj, grandegaj, grandetaj eĉ tute malgrandaj, vi povas elekti laŭ via plaĉo kaj grandeco de via loĝejo!

Ne, mi ne ŝatas hundojn, ĉar vi devas promenigi ilin por ke ili *feku* (*déféquér*) kaj *pisu* (*uriner*) ekster la domo. Kostas nutri ilin dum multaj homoj en la mondo suferas pro *malsato* (*faim*). Ili faras bruon. Kiam vi deziras vojaĝi, necesas trovi homon aŭ lokon por zorgi pri ĝi, kaj tio kostas.

10. *Ĉu ... ? Kial ?* Jes, mi ofte laboras en ĝardeno, ĉar ĝardeno konstante donas zorgojn: herbo kreskas, floroj sekiĝas. Se ne pluvas, necesas *akvumi* (*arroser*).

Ne, mi neniam laboras en ĝardeno, ĉar mi loĝas en domo, ĉe la 4a etaĝo kaj ne havas ĝardenon. Nur kelkaj floroj kreskas sur mia balkono.

Exercice B, page 40

1. u 2. aĵojn / aĵojn 3. idoj 4. ek

5. sian (*son père à lui renvoie au sujet. Si l'on mettait: la filo salutas lian patron, il saluerait le père d'un ami ou d'un voisin*)

Exercice A, page 42

1. Ŝi vokas lin, por ke li venu.
2. Ŝi vokas lin, por ke li helpu sian fratino.
3. Ŝi vokas lin, por ke li alportu sian libron.
4. Ŝi vokas lin, por ke li alportu ankaŭ sian skribilon.
5. Ŝi vokas lin, por ke li iru al la lernejo.
6. Ŝi vokas lin, por ke li aĉetu panon.
7. Ŝi vokas lin, por ke li iru viziti sian malsanan amikon.

Pas de transformation, il s'agit toujours d'un ordre, d'un souhait, d'un but, d'une tâche à accomplir, donc - u (à l'écrit, ne pas oublier la virgule entre les deux propositions).

Exercice B, page 42

1. Ĉu li ne salutas sian instruiston...?
2. Ĉu ŝi ne salutas sian amikino...?
3. Ĉu ŝi ne salutas sian kuraciston...?
4. Ĉu ili ne salutas sian instruiston...?
5. Ĉu li ne salutas sian amikon...?
6. Ĉu ili ne salutas siajn geamikojn...?
7. Ĉu ŝi ne salutas sian patrinon...?

RAPPEL
Lorsque l'adjectif possessif est sujet, il prend le genre du possesseur de li = lia, de ŝi = ŝia, de mi = mia, de ĝi = ĝia, de ili = ilia, etc. Lorsque le possessif renvoie au sujet, à la 3^e personne, c'est sia.

Exercice C, page 42

Cet exercice vous permet de pratiquer les pronoms relatifs. Exemples de réponses:

Marko, kiu nesufiĉe dormis, ŝatus kuŝi en la lito.

Ĉu vi konas la onklon, kiu donas hundidojn...?

Ĉu vi scias, ke la amikoj, kiujn Marko konas, ŝatas hundojn...?

Oka leciono – La bebo

Exercice A, page 45

1. *Kial ... ?* Marko vokas Ana, ĉar li deziras montri al ŝi la hundidon. / Marko vokas Ana, por ke ŝi vidu la hundidon.
2. *Kial ... ?* Li kaŝas la korbon, por ke ŝi ne tuj vidu, ke *temas pri* (*il s'agit de*) hundido / por ke ŝi ne tuj vidu la hundidon / por daŭrigi la surprizon.
3. *Ĉu ... ?* Ne, ne estas vera bebo, estas «bebo» de hundo, do hundido. Sed ĉar la homoj dorlotas siajn dorlotbestojn, multaj parolas pri sia hundo kiel ili parolus pri sia filo.
4. *Ĉu ... ?* Certe Ana ankoraŭ pensos pri Marko, sed ne unue. Unue ŝi pensos pri la hundido, kiu bezonas zorgojn kaj atenton.
5. *Rakontu ...* Supozeble Ana longe rigardos sian novan beston, promenigos ĝin (espereble ne en la brakoj), manĝigo ĝin, atendu, ĝis ĝi dormos.
6. *Kion ... ?* Por grandigi la hundon, do por ke ĝi grandiĝu kaj bone kresku, necesas anstataŭigi (*anstataŭ = à la place de, au lieu de*) la patrinon, do la hundinon: nutri, eduki, manĝigi, promenigi kaj tiel plu.

7. Ĉu ... ? Kiam? Pri kio? Jes, mi estas scivolema: mi volas daŭre lerni. Kiam mi legas kaj trovas vorton, kiun mi ne konas, mi serĉas ĝin en vortaro kaj notas por ne forgesi. Se mi aŭdas pri iu verkisto aŭ pentristo, kiun mi ne konas aŭ ne sufiĉe konas, mi esploras ĉe komputilo aŭ en enciklopedio. Mi estas scivolema pri multaj temoj: kiam mi vojaĝas, mi deziras pli bone koni la landojn kaj la homojn kaj iliajn kulturojn.
8. Ĉu ...? Kial (ne)? Ĉu mi estas laborema...? verŝajne jes, mi ne povas sidi kaj nenion fari. Ofte mi proponas min por fari laboron por la asocio, mi laboras senpage. Ofte mi estas volontulo por diversaj taskoj. Nun mi estas emerito, kaj daŭre instruas.
Ne, mi ne estas laborema! Mi faras la laboron, kiun la instruisto / mia ĉefo donis al mi, kaj sufiĉas! Mi ŝatas sidi kaj pensi pri nenio, rigardi la naturon, sidi kaj diskuti kun geamikoj, ne havi programon kaj vivi laŭ mia bontrovo (*trovi = trouver*).
9. Ĉu ... ? Kiam? Se «dankema» signifas diri «dankon», kiam mi ricevas donacon, aŭ servon, jes, mi estas dankema. Se «dankema» signifas daŭre dependi (*dépendre*) de homo, kiu helpis aŭ servis min, ne, mi ne estas dankema. Mi volonte reciprokos (*reciproka = réciproque*) helpon aŭ servon, kiam necesos, sed mi ne pensos «li faris servon al mi, mi devas fari servon al li!»
10. Kial ... ? Instruisto paroligas la gelernantojn, por ke ili parolu kaj progresu. Homo, kiu lernas lingvon kaj neniam parolas ĝin, ne respondas demandojn, ne praktikas la parolan lingvon, neniam progresos. La instruisto igas la lernantojn paroli, tiel ili scios, ĉu la frazo, kiun ili preparis en sia kapo, estas bona aŭ ne. La lingvokurso iĝas diskutejo.

Exercice B, page 46

1. nek / nek 2. nek / nek 3. da / da / da / da 4. igas 5. igas / igas / igas malsanan homon

Exercice C, page 46

Voici quelques exemples qui vous permettront de comprendre le sens des mots à traduire.

- sen-hom-igi* *Cunamo (tsunami)* senhomomigis la tutan regionon.
- mal-amiko* Kiu nenion *savis (sauver)* malamikon de havas (L. Z. Zamenhof).
- krom-nomo* La kromnomo de Ludoviko la XIVa estas «Reĝo-Suno».
- ĉambr-eto* Studento loĝas en ĉambreto ĉe la 6a etaĝo.
- alt-ega* La rusa caro, Petro la Unua, estis altega 2,03 metra!
- ek-ami* Tuj, kiam li vidis ŝin, li ekamis ŝin.
- dorm-ejo* Somere, miaj infanoj ferias kun geamikoj, ili dormas en dormejo.
- halt-ejo* La plej proksima aŭtobus-haltejo situas apud la banko.
- loĝ-ejo* Mia loĝejo estas triĉambra.
- mal-ofte* Mi malofte parolas anglan lingvon kun Angloj.
- ek-aŭdi* Mi unuafoje ekaŭdis pri tiu problemo antaŭ tri tagoj.
- kun-porti* Ni iros al la maro, ne forgesu kunporti vian bankostumon kaj *ĉapelon (chapeau)*.
- en-veni* Ne timu, envenu, la pordo estas malfermita.
- tra-rigardi* Bonvolu trarigardi la tekston, kiun mi sendos al ĉiuj.
- dev-igi* En alia lando, neniu devigas vin paroli angle, parolu unue vian lingvon se vi ne konas la lokan!
- trans-sendi* Mi ricevis retmesaĝon, kiun mi tuj transsendis al la homo, kiu zorgas pri tiu afero.
- mal-plen-igi* Neniu devigas vin tuj malplenigi vian glason da vino!
- mal-esper-igi* La reago de iuj, fronte al *migrantoj (migrants)* malesperigas min pri homara sento.

Exercice A, page 48

1. Mi deziras nek panon, nek kukon.
2. Mi deziras nek lernolibron, nek bildlibron.
3. Mi deziras nek verdan, nek ruĝan teon. (*teo, c'est le thé, mais aussi toute sorte d'infusion*)
4. Mi deziras nek rapidan, nek belan aŭton.
5. Mi deziras nek legi, nek aŭskulti rakonton.
6. Mi deziras nek kafon, nek teon.
7. Mi deziras nek dormi, nek legi.

Tre facila ekzerco, sufiĉas aldoni nek ... nek

Exercice B, page 48

1. La gepatroj purigas la ĉambron.
2. La gepatroj plenigas la glasojn.
3. La gepatroj purigas la telerojn.
4. La gepatroj manĝigas la bebon.
5. La gepatroj silentigas la infanojn.
6. La gepatroj laborigas la geknabojn.
7. La gepatroj lernigas la knabinon.

Utilisez le suffixe -ig- (faire faire, rendre)

Naŭa leciono – Revoj pri feriado

Exercice A, page 51

1. *Kial...?* Ana kaj Marko volas forgesi la lernejon, ĉar jam venis printempo kaj varma vetero, ili estas *lacaj* (*las, fatigués*), volas ripozi.
2. *Kien...?* Kien...? Ana dezirus vojaĝi al la maro por kuŝadi sur plaĝo, al suda lando por sunumi, do ŝi dezirus vojaĝi Italion / Italien / al Italio.
3. *Kial...?* Ĉar ŝi imagas, ke Italio estas la plej bona lando por bani kaj sunumi, kaj Italio ne estas tro malproksime de Francio; eble Ana lernas la italan, do jam ŝatas la landon, kie oni parolas tiun bel-sonan lingvon kaj kie ŝi povos *elturniĝis* (*se débrouiller*).
4. *Kien...?* Marko dezirus vojaĝi tra la mondo, do eble al Azio aŭ Sud-Ameriko. Li estas pli revema ol Ana.
5. *Ĉu...?* Malfacile ili povos ferii kune! Tamen se ili elektas Italion, Marko tie malkovros alian popolon, aliajn lingvojn, ĉar en Italio oni ankoraŭ nun parolas diversajn dialektojn. Norde de Italio, estas la Alpoj, do altaj montoj, kiuj interesas Markon.
6. *Ĉu...?* Mi ŝatus ferii kun Ana, ĉar ankaŭ por mi ferioj estas liber-tempo, kiam oni faras nenion, nur vivas laŭ sia bontrovo, sunumas kaj banas.
Mi ŝatus ferii kun Marko, ĉar mi serĉas ekzotikecon. Por mi, ferioj devas okazi en malproksima lando, kie la homoj parolas lingvon, kiun mi ne konas, kun kulturo, kiun mi ne konas kaj malkovros.
7. *Kiu...? Malmultekosta?* Verŝajne la feriado de Ana estos malpli multekosta ol la feriado de Marko, ĉar la vojaĝo estos malpli longa, eblos vojaĝi per aŭto, biciklo aŭ vagonaro. Al Azio necesos flugi. Tamen en la aziaj landoj (escepte de Japanio kaj Koreio) la *viv-nivelo* (*niveau de vie*) estas malpli alta ol en Eŭropo, kaj surloke eblas vivi malmultekoste se vi pretas vivi kiel la lokuloj.
8. *Ĉu...? Kial...?* Mi preferas veturi per aŭto, ĉar mi mem elektas kiam mi pretas forveturi, mi povas porti multe da valizoj, diversajn pakaĵojn, ktp. Sed veturilo poluas pli ol vagonaro kaj lacigas se vi estas la ŝoforo. Vagonaro estas komforta ĉar vi povas promeni en la koridoro, dormeti aŭ dormi, kundiskuti kun aliaj homoj, kiuj sidas apud vi. Sed vi ne povas elekti la horon, kaj nun, eĉ ne la tagon (pro *striko* (*grève*) de *fervojistoj* (*fer-voj-isto = cheminot*)).
9. *Kial...?* Nun multaj homoj vojaĝas, ĉar trajnoj, aviadiloj, aŭtoj kaj aŭtobusoj vojaĝas kaj vojaĝigas vin rapide, konforte kaj longdistance. En kelkaj horoj, vi troviĝas en alia lando aŭ alia kontinento! Iĝis modo ferii, ne en sia lando sed *eksterlande* (*à l'étranger*) kaj eblas aĉeti malmultekostajn biletojn se vi aĉetas ilin plurajn monatojn antaŭ la vojaĝo aŭ lastminute. Tamen nun estas tro da turistoj, ili malbonigas la lokajn vivmanierojn aŭ la naturon kaj multaj landoj volas *limigi* (*limo = limite*) la nombron da turistoj.
10. *Kial...?* Esperantistoj estas vojaĝemuloj, ĉar ili interesiĝas pri la diversaj lingvoj kaj kulturoj. Ofte ili lernis Esperanton ĝuste por vojaĝi. Ili ne havas lingvo-problemojn ĉar surloke ili renkontas lokajn esperantistojn, do havas komunan lingvon. Dank'al **Pasporta servo**, ili povas senpage tranokti ĉe esperantistoj. Avantaĝo estas, ke ili ne pagas dormoĉambron en hotelo, sed ĉefe ili eniras loĝejojn, vidas kiel la homoj vivas, faras demandojn por pli bone kompreni la lokon, kiun ili vizitas.
11. *Ĉu...?* Mi certe estus feliĉa se mi povus ferii nun, sed ne mi elektas la datojn! En la lernejo, la Ministerio pri Edukado decidas pri la ferioj / en mia laborejo, la ĉefo decidas, kiam la laboristoj ferios.
12. *Kion...?* Se mi havus multe da mono, mi aĉetus belan domon / mi vojaĝus al Azio / mi rondvojaĝus tra la mondo / mi ne plu laborus / mi donus ĝin al malriĉuloj / ...

Exercice B, page 52

1. des pli 2. ju pli 3. aro / aro 4. adis

ju pli ... = cause.. des pli = conséquence

Exercice C, page 52

<i>atend-ejo</i>	En la atendejo ĉe mia kuracisto, eblas legi multe da gazetoj.
<i>danc-ist-ino</i>	Mi rigardis <i>baleton</i> (<i>ballet</i>) kaj tre ŝatis la balet-jupon de la dancistinoj.
<i>dolĉ-aĵo</i>	Infanoj ŝatas dolĉaĵojn, eĉ se bonbonoj estas malbonaj por la sano kaj por la dentoj.
<i>ge-filoj</i>	Li havas gefilojn: unu filon kaj du filinojn.
<i>rid-igi</i>	Ŝi tre bone rakontis anekdoton kaj ridigis la publikon!
<i>tra-lasi</i>	La kurteno tralasis la sunlumon.
<i>pet-egi</i>	Li forte deziri promeni kaj petegis sian patrinon lasi lin iri.
<i>tra-nokti</i>	Ni haltis en vilaĝo kaj tranoktis en la loka hotelo.
<i>ban-ejo</i>	En la feriejo, la banejo situas ekstere.
<i>ge-fratoj</i>	Mi havas gefratojn, unu fraton kaj unu fratino.
<i>ek-koleri</i>	Kolerema infano facile ekkoleras.
<i>mal-viva</i>	Lia infano naskis malviva.
<i>pri-plori</i>	Mortis mia amiko, ni priploras lin.
<i>mal-saĝ-ulo</i>	Malsaĝulo kaj infano parolas la veron. (L. Z. Zamenhof)
<i>ten-ilo</i>	Tenu la sakon per la man-tenilon!
<i>antaŭ-nomo</i>	Mia antaŭnomo estas Petro. (<i>prénom, même, si au Japon ou en Hongrie, le prénom suit le nom</i>)
<i>ek-stari</i>	La gelernantoj ne plu ekstaras, kiam instruisto eniras la klasoĉambron.
<i>sid-ejo</i>	La sidejo de Universala Esperanto-Asocio situas en Nederlando.
<i>skrib-ist-ino</i>	Plej ofte skribistoj estas virinoj, kaj nun apud komputiloj ekaperas urbaj skribistoj por helpi homojn.
<i>trink-aĵo</i>	Somere, mia plej ŝatata trinkaĵo estas biero.
<i>mal-plaĉi</i>	Al mi malplaĉas maŝinoj, kiuj vokas min!
<i>bird-ido</i>	Birdido ne kapablis flugi kaj falis el la <i>nesto</i> (<i>nid</i>).
<i>mal-fru-eg-e</i>	La kunveno finiĝis je la 3a matene, do malfruege, do la <i>deputitoj</i> (<i>députés</i>) plendas!
<i>mal-san-ul-ejo</i>	Iom post iom malaperas malsanulejoj en mezgrandaj urboj.

Exercice A, page 54

1. Se li havus monon, li povus aĉeti aŭton.
2. Se ŝi ne havus laboron, ŝi povus ferii!
3. Se li havus aŭton, li povus veturi al Italio.
4. Se ŝi havus tempon, ŝi povus promeni tra la arbaro.
5. Se li aŭskultus, li povus respondi la demandaron.
6. Se ŝi lernadus, ŝi scius la lecionon.
7. Se ili ne malfruus, la gelernantoj ne ekridus.

Se-us, ...-us.

N'oubliez pas -us dans les deux éléments

Exercice B, page 54

1. Jes, ju pli bone oni ripozas, des pli facile oni lernas.
2. Jes, ju pli simpatia li estas, des pli multe li vendas.
3. Jes, ju pli riĉa oni estas, des pli da (neveraj) amikoj oni havas.
4. Jes, ju pli da ferioj ili havas, des pli ĝojaj ili estas.
5. Jes, ju pli sana vi estas, des pli feliĉa vi estas.
6. Jes, normale, ju pli multe oni laboras, des pli da mono oni havas.
7. Jes, ju pli ofte oni parolas, des pli bone oni parolas.

Deka leciono – Laboremo

Exercice A, page 57

1. *Kie... ?* Marko kaj lia patro matenmanĝas, supozeble en la kuirejo, aŭ se la vetero estas bela sur la balkono aŭ la teraso, sed ĉiuokaze, ili matenmanĝas hejme.
2. *Kiun... ?* Marko havas kutiman problemon: mankas al li mono. Alproksimiĝas la ferioj, li ŝatus vojaĝi sed lia monujo estas malplena!
3. *Kion... ?* La patro kredas, ke bone estas se la monujo pleniĝos. Sed mono ne falas el la ĉielo, necesas perlabori ĝin
4. *Ĉu... ?* Marko estas pli malpli serioza knabo; li malfruas en la lernejo, sed tamen li vizitas ĝin regule; li pensas pri la aliaj (li donacis hundidon al Anna por plezurigi ŝin). Se li volas perlabori monon, li certe serioze laboros.
5. *Kie... ?* Li deziras labori tie, kie la patro trovos por li laboron, do en la fabriko, kie laboras sinjoro Rapid. Se la patro estus fervojisto, Marko trovus laboron ĉe la fervojo; se la patro laborus en banko, li certe iĝus portempa bank-oficisto. Ne gravas la laboro, gravas, ke ĝi portu monon al Marko.
6. *Kial... ?* La patro bone konas sian filon, li scias, ke Marko malfacile vekiĝas kaj ellitiĝas frue. Pro tio li atentigas Markon pri la devo vekiĝi por ne malfrui en la laboro!
7. *Kial... ?* La patro konsentas helpi lin por faciligi al Marko la serĉadon de portempa laboro. Ju pli rapide Marko eklaboros, des pli rapide li ricevos monon kaj povos ferii!
8. *Laŭ vi, pri kio... ?* Kiel patro de junulo, sinjoro Rapid certe konscias, ke nun Marko ne plu estas knabo, li iĝis pli serioza. Li ne simple petis monon de la patro, li pretas labori eĉ kiel helplaboristo. La patro certe ĝojas pri la evoluo de sia filo.
9. *Pri kio... ?* Marko pensas, ke finfine li havis seriozan diskuton kun sia patro. Li prepariĝas al la ideo labori dum parto de la ferioj por pli bone ĝui la alian parton. Li esperas, ke lia patro rapide sukcesos trovi laboron por sia filo.
10. *Kio... ?* Post la matenmanĝo, la patro iras al la fabriko, kie li laboras. Marko finpreparas sin, lavas sin, surmetas pli elegantan vestaĵon se li komencos viziti diversajn entreprenistojn, kiuj povos *dungi* (*embaucher*) lin. Aŭ li komencos esplori ĉe la komputilo, ĉu troviĝas diversaj proponoj pri someraj laboroj por studentoj.

Exercice B, page 58

1. iĝas / iĝas / iĝi
2. ebla
3. ujon / ujon / ujo / ujo

Exercice A, page 60

1. Jes, oni diras, ke ŝi grandiĝis.
2. Jes, oni diras, ke ŝi juniĝis.
3. Jes, oni diras, ke ŝi saniĝis.
4. Jes, oni diras, ke ŝi maldikiĝis.
5. Jes, oni diras, ke ŝi riĉiĝis.
6. Jes, oni diras, ke ŝi gajiĝis.

Exercice C, page 60

1. Estus bone, se vi helpu min.
2. Estus bone, se vi instruu al mi la lingvon.
3. Estus bone, se vi parolu al mi pri Esperanto.
4. Estus bone, se vi havigu al mi korespondanton.
5. Estus bone, se vi instruu al mi kanton.
6. Estus bone, se vi plibonigu mian ekzercon.
7. Estus bone, se vi legu al mi la rakonton.

Kroma leciono

Page 62

Voici un exemple de récit écrit à partir des photos affichées sur cette page.

Sur la tablo, antaŭ mi kuŝas kvar pasportoj de eŭropaj civitanoj, gvidlibro pri Japanujo en la franca kaj flugbiletoj de japana flugkompanio. Kial...? Ĉar mi kaj mia familio prepariĝas al vojaĝo al Japanio. Pasporton ni bezonas, ĉar ni vizitos alian kontinenton ol Eŭropa Unio; gvidlibron ni uzis por prepari la vojaĝon, ankaŭ informojn ĉe la reto ni uzis. Sed survoje mi tre ŝatas teni libron en la mano, por legi, relegi aŭ noti. Por flugi, ni elektis japanan kompanion, pli seriozan ol nekonatan kompanion, ĉar la vojaĝo estas longa kaj la aviadilo estu komfortaj kaj modernaj, eĉ se la kosto estas pli alta.

Vi eble demandas vin, kial ni elektis tiun foran landon. Se vi legis paĝon 63, vi konstatis, ke mi de pluraj monatoj korespondas kun amiko, kiu loĝas en Japanio kaj laboras kiel oficisto en Tokio. Li grandigis en mi la deziron konatiĝi kun la japana kulturo kaj la loĝantoj, des pli, ke liaj gepatroj vivas en urbeto, kie konserviĝis la malnovaj kulturoj. Ni do esperas, ne nur viziti la turismajn lokojn kaj grandajn urbegojn, sed ankaŭ pli tipajn urbetojn aŭ vilaĝojn (se ankoraŭ restas). Evidente, ni ne vizitos la nordon kaj Fukuŝima, ni volas riski ricevi nuklean energion!

Estas mia unua vojaĝo per aviadilo. Ĝenerale mi ne veturas per aviadilo, kiu pli poluas la aeron ol vagonaro, sed la vojaĝo per trajno tra Siberio, *kvankam (bien que)* interesa daŭras unu semajnon, do mi elektis resti pli longe en Japanio. Mi estas ĝoja, senpacienca, ekscitita kaj mi fotas la pejzaĝon, kiun mi vidas tra la fenestretoj kaj en la salono de la aviadilo.

Simboloj de Japanio estas monto Fuĝi, sur kiu eĉ somere kuŝas blankaj neĝoj; ĉerizarboj, kiuj floras printempe kaj temploj apud lagoj. Mi forte esperas, ke mi vidos ilin. Nur la ĉerizarboj ne plu surhavas florojn en somero, sed mi kontentiĝos pri fotoj!

Alia simbolo de Japanio estas rapidegaj trajnoj, kiuj vojaĝas tre rapide. Ili aperis en Japanio antaŭ ol la rapidaj trajnoj en Francio. Amikino, kiu jam vizitis Japanion, rakontis, ke ili haltas nur du-tri minutojn, do la turistoj devas rapide forpreni siajn pakaĵojn kaj eliri el la vagono! La trajno ne atendu ilin!

Mi ankaŭ interesiĝas pri kuirado, eĉ se pli kaj pli troveblas (= estas troveblaj) japanaj restoracioj en Francio, mi senpacience atendas la momenton manĝi specialaĵojn surloke. Laŭdire, la restoracioj montras foton de la manĝaĵoj kun numero, do eĉ se fremda turisto ne legas japanan menuon, li povas *mendi (commander)*. En la trajnoj, eblas aĉeti *skatolon (boîte)* en kiu troviĝas aro da manĝaĵoj, do kompleta menuo kun antaŭmanĝo kaj ĉefa manĝo. Mi ne certas, ke mi rapide kapablos manĝi per bastonetoj, mi kutimas je forko kaj kulero!

Mi scias, ke nokte en ĉiuj grandaj urboj ne mankas koloraj lumoj kaj koloraj ekranegoj, sed mi pli interesiĝas pri tipa vestaĵo, kimono. Laŭdire, nur okaze de festo, junulinoj aŭ virinoj surmetas belegajn kimonojn, sed vespere, post la laboro, ankaŭ viroj surmetas simplan hejman kimonon.

Mi certe kolektos ĉiujn et-aĵojn (reklamiloj, enirbiletoj, manĝbastonetoj), kiujn mi ricevos surloke: mi ilin konservas por rememori pri la vojaĝo, post la reveno hejmen. Kaj mi montros ilin al miaj geamikoj, kun la fotoj, kaj mi *kvazaŭ (comme si)* duan fojon faros neforgeseblan vojaĝon tra Japanio.

Pour toute question ou remarque sur ce document, veuillez écrire à metodo11@esperanto-france.org